Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 23-an de oktobro 2014 per Skype.

(Protokolo aprobita la 20-an de novembro 2014.)

Partoprenis:
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranes en Trondheim

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 9-an de oktobro
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 43 204,-
Skagen Høyrente kr 125 796,-
La kasisto sendos post ĉirkaŭ semajno atentigan leteron al tiuj membroj, kiuj ĝis tiam ne pagis kotizon por tiu ĉi jaro.

3. Seminario
Novaj prelegontoj ne anonciĝis, sed ni ricevis novajn aliĝojn por aŭskulti la seminarion. Laŭ la nuna stato ni devos kunkupligi ses lokojn. La prelegontoj prefere provu la teĥnikon duonhoron antaŭ la komenco de la seminario. Ili povas ankaŭ sendi materialon de la prelego rete en la formato PDF al Herman, kiu plusendos ĝin al la partoprenontoj. La prelegoj daŭros ĉirkaŭ po 30 minutoj.

4. Eventualaĵoj
Nenio eventualaĵo.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 20:15
La venonta interkonsiliĝo okazos la 20-an de novembro 2014.

Raportis Mario Machlik